

DIA REGNO
ISSN 0167-9554

DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 3 (918) • 2016 •

Malkaŝo de Via vorto klerigas, ĝi prudentigas
simplanimulojn. Mi malfermas mian buŝon kaj
enspiras, ĉar mi deziregas Viajn ordonojn.

Psalmaro 119:130



KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
☎ +(0)420 723 672 335;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':
CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Nygatan 10 A; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_board@yahoo.se

Kontrollegis: Éva FARKAS-TATÁR, Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

ENHAVO

Pri kio efektive temas la festo de Pentekosto	51
En Dia Regno antaŭ 50 jaroj - La Esperanto-Biblio 40-jara	54
Vojaĝo al Bolivio	58
Graco	61
Tutmonda Etiko kaj Paco Indiana	62
Kongresinformoj - kongreso 2016	64
Fincaj raportoj kun klarigoj	66
Informetoj	70
La malapero de David Kelso	71
En Maj' la grizo de l'natur'	72

Redaktoraj vortoj

Gerrit Baveling finas sian predikon (vidu la sekvajn paĝojn) tiel ke ni uzu la ordonojn de Dio kiel vojmontrilojn kaj "Ni vivu laŭ la revo de Dio!".

Anstataŭ mem provu esti saĝa, mi ligas la vortojn de Baveling kun la kongresa kaj revua temo, uzante la pensojn de Nathan Söderblom, nobelpremiita ĉefepiskopo komence de la 20a jc.

Iam li skribis ke "La vortoj [de Jesuo] estas daŭre validaj. Kristo havas multon por diri al la homoj. Kristanismo ne finiĝis. Kiu tiel kredas, trompas sin mem. Kristanismo ne estas tombo zorgenda, sed vivo por vivi en la mondo. La vorto de Kristo al la disĉiploj ne estis 'haltu', sed 'iru!' Estas sencele servi la aferon de Kristo retenante staton aŭ vidpunkton, kiuj forpasis kaj jam faris siajn servojn. Neniu scias en kiu formo, ekstera aŭ interna, la Spirito de Kristo estonte agos en la mondo. Ni nur povas resti en la vero, kiun ni spertis, kaj senĉese aŭskulti, kion la Spirito diras al la eklezio".

Ĉu ni komprenas kiel vivi nian vivon?

Pri kio efektive temas la festo de Pentekosto?

Prediko en Munkeno, dum pentekosto 2016

Gerrit BERVELING, NL

Kaj kiam venis la Pentekosta tago, ili ĉiuj estis unuanime en unu loko. Kaj subite venis el la ĉielo sono kvazaŭ blovego de forta vento, kaj ĝi plenigis la tutan domon, kie ili sidis. Kaj al ili aperis disirantaj langoj kvazaŭ el fajro, kaj sidiĝis sur ĉiun el ili. Kaj ĉiuj pleniĝis de la Sankta Spirito, kaj komencis paroli aliajn lingvojn, kiel la Spirito donis al ili parolpovon.

Kaj en Jerusalemo tiam loĝis piaj Judoj el ĉiu nacio sub la ĉielo. Kaj kiam aŭdiĝis tiu sono, la homamaso kunvenis kaj miregis, ĉar ĉiu aparte aŭdis ilin paroli per lia propra dialekto. Kaj ĉiuj konfuziĝis kaj miris, dirante unu al alia: Rigardu! Ĉu ne estas Galileanoj ĉiuj tiuj parolantoj? Kiel do ni aŭdas ĉiu en sia dialekto, en kiu ni naskiĝis? Partoj kaj Medoj kaj Elamanoj, kaj loĝantoj en Mezopotamio, Judujo, Kapadokio, Ponto kaj Azio, Frigio kaj Pamfilio, Egiptujo kaj la partoj de Libio apud Kireno, kaj pasloĝantaj Romanoj, Judoj kaj prozelitoj, Kretanoj kaj Araboj — ni aŭdas ilin paroli en niaj lingvoj la mirindaĵojn de Dio.

Agoj 2:1-11

Eble por kelkaj iom stranga demando. Tamen, ni pripensu, kion ni aŭdis en la legaĵo el Agoj de Apostoloj: “Kiam venis la tago de Pentekosto...” ktp. Ion similan oni nepre ne trovas en kiu ajn evangelio pri la naskiĝo de Jesuo: “Kiam venis la tago de Kristnasko ...” ktp.

Kristnasko ja estas tipe Kristana festo, eĉ ne tre frua. Almenaŭ ne el la plej unua kristanismo. Centra en Kristanismo estas ja dekomenso la Paska festo, la ciklo de la Pasiono, la kruco: la morto kaj la resurekto de Jesuo.

Kristnasko aldoniĝis nur multe pli poste.

Sed kio do estas Pentekosto? – Ĝi okazas, kiel jam montras etimologie la Greka vorto pentekoste je la 50a tago post Pasko.

En Izraelo tiam oni festis Ŝavu’ot [תועובש] – origine la post-sep-semajna festo de la rikolto, en posta periodo oni ekfestis tiutage, ke ĉe Sinaj oni ricevis la Toraon. En jam frua epoko la Greklingvaj Hebreoj ekuzis por ĝi la indikon pentekoste – la 50a tago. Do en la teksto de Agoj ne estas mirige, ke ĝi komenciĝas per: “Kiam venis la tago de Pentekosto ...” ja estis festo jam konata.

Agoj de Apostoloj rakontas, ke tiutage kvazaŭ naskiĝis la Eklezio: la nova

komumumo de la disĉiploj de Jesuo kaj ties sekvantoj. La apostoloj ekpredikis laŭte kaj malkaŝe – kaj kun sukceso. Eble oni povas diri, ke la malnova origina signifo de la Hebrea festo Ŝavu'ot – de la rikolto – ekhavis novan signifon: komenciĝis la unua ek-rikolto fare de la apostoloj. Laŭ la rakonto aldoniĝis tiutage “ĉirkaŭ tri mil homoj” [2:41].

Mi kredas, ke estas saĝe, kiom eble resti ĉe la teksto mem, sen aldono de niaepokaj demandoj aŭ hezitoj: ni vidas do, ke ĉeestis amaso da homoj – pias Judoj el ĉiuj landoj sur la tero: kaj sekvas tuta serio da impone sonantaj geografiaj nomoj – sed ni ne forgesu, ke antaŭ kelkaj semajnoj – ja antaŭ nuraj sep semajnoj – okazis ĝuste la granda ĉef-festo de Pasko. Do al Jesusalemo, kiel tradicie, migradis pilgrime amas-

egoj por tie tion kuncelebri, kaj poste pluraj – certe ne malmultaj homoj – ankoraŭ restis en la urbo ankaŭ por la Pentekosta – rikolta – festo de la Dia donaco de la Torao ĉe la monto Sinaj.

Tiu Torao intencis montri, kiamaniere vivi laŭ la revo de Dio: la ordonoj, kiujn ĝi enhavas, kaj kiujn tute prave per vortludeto mi povas dusignife nomi ordonojn de Dio: Li pere de ili ja donis oron al ni, en tiuj ordonoj: kaj forte atentu: ĉiuj ordonoj estas en formo de estonto: Vi ne mortigos, vi ne maljuste atestos kontraŭ viaj najbaroj, vi ne ŝtelos ktp ktp – en pura imperativo estas nur la ordono: respektu vian patron kaj vian patrinon (tiuj ja jam dum la dezerta vojaĝado kunvojaĝis ...)

Brilaj ordonoj, belaj oraj donoj de Dio, kvazaŭ valoregaj diamantoj, zorge kunportendaj survoje al la Promesita

Tial mi sciigas vin, ke neniu parolanta en la Spirito de Dio diras: Jesuo estas anatemita; kaj neniu povas diri: Jesuo estas Sinjoro, krom per la Sankta Spirito.

Ekzistas diverseco de donacoj, sed la sama Spirito. Kaj ekzistas diverseco de servoj, kaj la sama Sinjoro. Kaj ekzistas diverseco de energioj, sed la sama Dio, kiu energias ĉion en ĉiuj. Sed al ĉiu estas donita la elmonro de la Spirito por utilo. Ĉar al unu estas donita per la Spirito la vorto de saĝeco; kaj al alia, la vorto de scio, laŭ la sama Spirito; al alia, fido, en la sama Spirito; al alia, donacoj de resanigoj, en la unu Spirito; kaj al alia, energioj por mirakloj; kaj al alia, profetpovo; kaj al alia, distingoj de spiritoj; al alia, diversaj lingvoj; kaj al alia, interpreto de lingvoj; sed ĉion tion energias la unu sama Spirito, dividante al ĉiu aparte, kiel al li plaĉas.

Ĉar kiel la korpo estas unu, kaj havas multajn membrojn, kaj ĉiuj membroj de la korpo, estante multaj, estas unu korpo; tiel same ankaŭ estas Kristo. Ĉar en unu Spirito ni ĉiuj baptiĝis en unu korpon, ĉu Judoj aŭ Grekoj, ĉu sklavoj aŭ liberaj; kaj ĉiuj estas trinkigitaj el unu Spirito.

1 Korintanoj 12:3-13

Lando – tra la vastega dezerto: Vi ne ŝtelos – do survoje ni jam ekprovu, ĉu ni kapablas vivi laŭ tio. Se foje sen-sukcese, ni ree ekprovu, ni ne mal-esperu. Ĉar iam ... iam ... iam, foje, sur tiu Promesita Tero – tiam certe ni kapablos vivi laŭ tiuj Diaj ordonoj ...

Kaj nun, en Agoj de Apostoloj eksonas forta vento – la vento en la Biblio plurfoje simbolas Dion, jam tuj komence de Genezo la spirito de Dio – kiel vento – ŝvebis super la akvo (foje nova traduko redonis tion per: fortege ŝtormis super la akvo – sekvis tion tia ŝtormo da protestoj, ke en dua eldono reaperis la spirito de Dio, kiu ŝvebis ...).

La profeto Elija rekonis la ĉeeston de Dio male en tre softa brizo, ege malforta venteto – sed nu, kiel ajn, ĉi tie okazas kvazaŭ loka ŝtormo kaj kunamasigas la loĝantaro de Jerusalemo: kio okazas ja? Ekaperas flamoj fajraj – bela bildo, kiu montras, ke oni atentu: jen aŭskultu, kion ili tie ekrakontos! Kaj komenciĝas baldaŭ la unua granda prediko pri Jesuo, tiu homo, kiun vi homoj mortigis, sed kiun relevis Dio EL LA MORTO!

En Pentekosto oni do ekfestas Paskon: Releviĝis, resurektis Jesuo – la Justulo de Dio.

Kaj se tio estas vera, la sole ebla konkludo estas, ke Jesuo do ne estas simple iu ajn homo – sed li ja estas la Sinjoro; li sidas ĉe Dio sur la sama trono, kiel poste rakontos aliaj tekstoj.

Kion Paŭlo skribis al la Korintanoj, tio ja fontas el lia kompreno pri Pasko kaj Pentekosto kune: Jesuo estis krucumita, do iasence li estis malbenita, –

sed Dio lin levis el la morto: sekve li estas la Sinjoro. Tio estas verŝajne la plej unua, kaj plej konciza kredkonfeso el la tuta kristana historio: *Jesuo estas Sinjoro*.

Kaj kio rezultas el tio? Rezultas nia nun-monda realo, la realo de Paŭlo fakte: Paŭlo konstatis, ke la komunumoj, kiujn li konis, tion vivas: rezultas ĉiuspecaj agadoj de homoj, kiujn inspiras la unu Spirito – jen tiu havas vorton de saĝeco, jen tiu havas la fidon, jen tiu scias resanigi, jen tiu faras miraklojn – aŭ scias distingi bonajn disde malbonaj spiritoj ktp. Sed kio ajn estu: ĉio estu nur por la bono kaj utilo de ĉiuj.

Laŭ Paŭlo ni ĉiuj estas unu komunumo – unu korpo – kaj ĉiu havas sian taskon aŭ lokon, sed ĉiuj ni trinkis el la sama spirito. Ĉu Judoj aŭ Grekoj, ĉu sklavoj aŭ liberaj – en alia letero li aldonas eĉ: ĉu viroj aŭ inoj. Ĉiuj ni estas unu en Kristo.

Jen la idealo – sed ĉu ni kapablas vivi ĝin? Mi supozas, ke minimume je ekmomentoj eblos vivi tion eĉ en nia ĉiutaga realo.

Hodiaŭ kaj morgaŭ – Pentekoste – ni festas, ke naskiĝis tiu unika unuo: la Eklezio – momente ni ne atentu pri et-homaj problemoj inter ni. Ni nun emfazu la kernon: Kristo resurektis – jen Pasko – kaj ni homoj reage formunian vivon laŭ la ordonoj, kiujn ni ricevis kiel vojmontrilojn – ek al la Promeso. Ni vivu laŭ la revo de Dio!

Amen.

En Dia Regno
antaŭ 50 jaroj

La Esperanto-Biblio 40-jara

En tri partoj – dua parto

Karl-Olof SANDGREN, SE

En tri numeroj de Dia Regno en 1966 Karl-Olof Sandgren skribis tri-partan serion pri la Biblio. Pro la ĉi-jara temo de nia kongreso, kiu rilatas al nia legado kaj kompreno pri tio, kion ni legas en la Biblio, tiu eta serio estas interesa ankaŭ por ni. Jen la dua parto. /Redaktoro

La unua komitato

La laboroj pri la oficiala Esperanta Biblio okazis en Britujo, kaj dum la universala kongreso en Cambridge (1907), kie mil diverslandaj voĉoj eldiris unuafoje en la sama lingvo la preĝon Patro Nia, formiĝis – laŭ propono de Edmond Privat – provizora komitato por akceli la tradukadon kaj eldonadon de la tuta Biblio.

Tiu komitato konsistis el Anglikana paroĥestro Rust, Britujo, Katolika pastro Peltier, Francujo, kaj Luterana pastoro Schneeberger, Svisujo. (Tiuj tri estis tiutempe ĉe la pinto de la Esperantomovado – pastoro Schneeberger kunprezidis la unuan universalan kongreson, pastro Peltier faris la unuan Katolikan kaj paroĥestro Rust la unuan – laŭ alia fonto la duan – Protestantan predikon en Esperanto.) Krome estis komprenite, ke ankaŭ Zamenhof estu membro de la komitato.

Sed preskaŭ tuj venis konfliktoj, kiuj disigis la komitaton kaj endanĝerigis la tutan laboron. Unue la intenco estis, ke la Esperanta Biblio estu komuna por

Protestantoj kaj Katolikoj. Sed la Katolika Eklezio tion malaprobis, kaj pastro Peltier ne povis akcepti la komitatecon.

Sekvis la Ido-skismo. Ankaŭ ĝi rikoltis en la malgranda Biblia komitato: Pastoro Schneeberger foriris kaj poste fariĝis prezidanto de la Ido-Akademio. Restis Zamenhof kaj Rust. En 1909 la lasta skribis:

”Pro bedaŭrindaj kaŭzoj – kiujn mi ne devas ĉi tie priskribi detale – la internacia komitato por la traduko de la Sankta Biblio jam ĉesigis sian agadon, kaj ĝi ne ekzistas plu.”

La Britoj transprenas

Sed por la Britoj la Biblio estis kara kaj urĝa afero. Por irigi la laboron ili de sia nacia kongreso en Leeds (1909) elektis la jenan „Esperantistan Biblian Komitaton” pure Britan: Rust – jam nomita –, ĉefdiakono Lindsay, profesoro Mc Fadyen, pastroj Beveridge, Senior kaj Poynder. La posta universala kongreso, tiu en Barcelono, kvazaŭ sankciis la novan komitaton per sia deziresprimo,

ke la Brita kaj Alilanda Biblia Societo eldonu la Esperantan Bibliion.

Nun la afero fine komencis progresi, kaj la Komitatoj ricevis la helpon de kelkaj aliaj eminentaj Britaj Esperantistoj, Akademiano Wackrill, la konata gramatikisto majorgeneralo Cox kaj Anglikana – aŭ Metodista – pastro Edmonds.

Rust kaj Wackrill faris la ĉefan laboron super la traduko, kiu efektive estis jam farita de kvin aŭ ses kompetentuloj. En 1926 Rust jene priskribis la laboron per letero al fraŭlino Peckover:

”La manuskriptoj venis al mi; mi faris la unuajn korektaĵojn; S-ino Rust tajpis la tutan Novan Testamenton laŭ la formo korektita de mi. Mi tiam sendis la manuskripton al S-ro Wackrill, kiu treege zorge kontrolis la tuton, kaj tiam resendis ĝin al mi. S-ino Rust re-tajpis la manuskripton, kaj ĝi estis sendita al la presisto. S-ro Wackrill kontrolis la presprovaĵojn.”

Paroĥestro Rust, kiu prezidis la Esperantistan Biblian Komitaton, eldonis specialan gazeton, La Biblia Tradukisto, kiu raportis pri la atingoj kaj ankaŭ presigis partojn de la kompletigitaj tradukoj, i.a. Malaĥi, Luko, Filemono.

La Kristanaj Esperantistoj, kiuj ĝuste tiutempe komencis formi sian kunulecon per la gazeto ”Esperanto en la servo de la Dia Regno” kompreneble kun granda intereso sekvis ĉi tiun laboron kaj felietone presigis la Evangelion laŭ Johano.

Klopodado de Bolingbroke Mudie

La NT-libroj estis dividitaj en kvar

grupoj kaj bazo estis la samaj Grekaj tekstoj, kiuj estis fonto por la Brita reviziita Biblio (1884). Jam en la jaro 1911 la traduko de La Nova Testamento estis finita, kaj restis la zorgoj pri la presigo.

La unua, kiu laŭ organiza vidpunkto provis aranĝi eldonadon de la Biblio, estis H. Bolingbroke Mudie, poste prezidanto de la Brita Asocio. En sia antaŭparolo al la verketo ”La grava signifo de l' Nova Testamento en Esperanto” li diras i.a.:

”Kiam en 1903 la Brita kaj Alilanda Biblia Societo rifuzis mian peton, ke ili tiuj presigu la Bibliion en Esperanto, mi ricevis unu el tiuj oftaj malvarmaj duŝoj, kiuj tiom refreŝigas la propaĝandiston.”

La klopodado de Mudie estis interrompita de la unua mondmilito kaj de lia akcidenta morto dum tiu milito. Sed li jam faris grandegan laboron, pritraktante la Biblian aferon kun la firmo Hachette; kun la Centra Librejo en Parizo kiu akiris de Hachette ĉiujn kopirajtojn de la Zamenhofaj tradukoj kaj ankaŭ la restantan provizon de la jam presitaj libroj; kun fraŭlinoj Peckover kaj aliaj. Post la milito oni daŭrigis la laboron sur la bazo, kiun li konstruis.

La Nova Testamento aperas

Kelkajn jarojn post la ”malvarma duŝo” de Mudie la sinteno de la Biblia Societo estis pli favora, kaj ĝi konsentis eldoni La Novan Testamenton. En 1912 ĝi estis jam preta. La libro estis pli grandformata (10 x 15 cm) ol la nun vendata, sed

tamen sufiĉe malgranda por permesi portadon en la poŝo. La plej proksime sekvantaj eldonoj havis la saman formaton.

Jam la apero de La Nova Testamento ja estis granda venko, sed oni ne hezitis tuj komenci okupiĝi pri la kompleta Biblio. Granda malhelpo tamen estis la mondmilito, kiu nun dividis ankaŭ la Esperantistan mondon kaj rompis la kontakton de D-ro Zamenhof kun la Britaj kolegoj.

Sed en Varsovio Zamenhof zorgeme daŭrigis. En unu priskribo de sia traduka laboro li diris i.a.:

"Mi faris la tradukon kiel eble plej zorgeme, havante antaŭ miaj okuloj krom la Hebrea originalo ankaŭ, kelkajn naciajn tradukojn. Mi antaŭvidas, ke kelkaj legantoj plendos, ke multajn lokojn en mia traduko de la Psalmoj ili ne komprenas. Tial mi atentigas ilin, ke, se ili volas legi 'ion facile kompreneblan', ili ne legu la Psalmojn. Mi donas nur tradukon, sed ne komentarion, kaj mi ne povas permesi al mi arbitre ŝanĝi la tekston."



Priscilla Hannah Peckover /Wikipedia

Ĝis nur kelkaj semajnoj antaŭ sia morto Zamenhof reviziadis sian verkon, kaj estas konsole pensi, ke la Britaj gesamideanoj zorgis, ke li ricevu monajn rimedojn por pasigi siajn lastajn jarojn en sufiĉe komfortaj cirkonstancoj (oni pagis £500, donacitajn de la fratinoj Peckover). Tio permesis al li koncentriĝi sur la grava tasko.

Zamenhof urĝas

Sed en la lasta tempo li sentis, ke lia morto estas proksima, kaj ke li devas labori rapidece, alie li ne finos sian taskon, kaj sekve li ne povis dediĉi al tiu tasko la tutan dezirindan zorgon. Dume li ŝanĝis sian metodon koncerne diversajn detalojn de la lingvo kaj enkondukis novajn radikojn, ne uzitajn en la pli frue tradukitaj partoj.

Pro la milito oni ne povis al Britujo tuj sendi la manuskriptojn, kaj nur kelkaj estis pretaj. Privat prenis kun si el Varsovio al Svisujo la manuskriptojn de Jeremia, Jehezkel, Plorkanto kaj Ezra, aliajn sinjorino Zamenhof post la militfino sendis rekte al Britujo. Pri ili ŝi skribis i.a.:

"Restas ankoraŭ 300 paĝoj, kiujn mi sendos al vi post du monatoj, ĉar mi devas mem fari la kopion."

Ŝajnas do, ke Zamenhof manskribis sian tradukon, kaj ke lia edzino poste tajpis ĝin (supozeble la manskribita teksto estas perdita). Sed, W. Harvey en artikolo esprimis la opinion, ke la manuskriptoj transdonitaj (do la pli fruaj) estis faritaj de Zamenhof mem, propramane per maŝino. Tiun opinion, dubitan de frato de Hoog en Nia Historio, sinjorino

Zamenhof konfirmis per letero al Warden (vidu poste). Nu, sen dubo tamen la multaj korektoj kaj aldonoj estas faritaj per la mano de Zamenhof mem.

Je Kristnasko 1919 ĉiuj manuskriptoj de La Malnova Testamento estis fine ricevitaĵoj de s-ro Warden, sekretario de la tiam reorganizita Biblia Komitato (Rust restis kiel prezidanto; krome restis la anoj Lindsay kaj Beveridge; McFadyen servis kiel konsultanto).

Eble tio sonas strange, kiam temas pri Zamenhofa traduko, sed fakte granda reviziado estis tre necesa, kaj oni memoru, ke la komitato reviziis la manuskriptojn kun plena konsento kaj laŭ deziro de Zamenhof mem, kaj en la direkto, kiun li mem montris kaj petis.

Krome ne estas necese prisilenti, ke ne sole en la antaŭe eldonitaj partoj, sed ankaŭ en la maŝinskribitaj manuskriptoj estis granda nombro da eraroj. Ekz., jen mankis tuta alineo, jen parto de alineo. Se oni komparas kun la libroj el la eldonejo Hachette, oni miras pro la nombro de la korektoj – 605 nur en la unuaj 41 Psalmoj.

Diskutoj pri la revizia laboro

Ne estis eviteble, ke la bonintenca revizia laboro tamen vekis iom da diskutoj – kelkaj tre akraj –, kaj iuj volis eĉ eldoni la Zamenhofan tekston en ĝia origina stato, aparte aŭ apud la reviziita. Kompreneble tio ne estis laŭ la deziro de la Biblia Societo, nek laŭ la ekonomiaj eblecoj realigebla. Aliaj volis aldoni la apokrifajn verkojn, sed ankaŭ tio estis kontraŭ la principoj de la Societo.

La nuna prezidanto de la Akademio de Esperanto, profesoro Waringhien diras:

”Kvankam oni nun ne povas uzi la presitan Biblion por scienca studo de la Zamenhofaj lingvo kaj stilo, tio nenion deprenas de la literatura graveco kaj fideindeco de tiu ĉefverko.”

Ni povus aldoni: Nek ĝi deprenas de la religia signifo.

Sed nun ankaŭ La Nova Testamento bezonis poluradon, ĝi bezonis adapton al la klasika stilo de Zamenhof en La Malnova Testamento. S-ro W. Baily, unu el la ĉefaj prilaborantoj, diras:

”Malfeliĉe tiu tasko estas nur parte plenumita, ĉar la komitato forte strebis, ke la plena Biblio eliru el la presejo antaŭ la Edinburga Kongreso, kaj ne restis sufiĉe da tempo, por fari la reviziadon en kontentiga maniero. – Tamen la nova eldono estas jam multe pli bona, ol la antaŭa.”

La prezidanto de la Biblia Komitato, paroĥestro Rust, estis malforta kaj malhelpita preni ŝarĝan parton. Tial, kun permeso de la Biblia Societo oni aligis kelkajn novajn Esperantistojn kun Hebrea kono, nome pastrojn Allbrook, Elliott kaj Price. D-ro Kilgour en la Societo ankaŭ konsentis pri la neoficiala helpo de laikuloj. Tiel, la tekstojn kontrolis ankaŭ la Akademianoj Bailey kaj Wackrill, kaj presprovaĵojn legis aliaj nekomitatanoj – krom Bailey: Page kaj Warden.

(daŭrigota)

Vojaĝo al Bolivio

Vilĉjo GOLDSMITH, Usono

Mi foriris al Bolivio kiel misiisto en la jaro 1959 kiam mi estis juna viro de preskaŭ 22 jaroj. Post jaro kaj duono, mi reiris al Usono kaj edziĝis al mia fianĉino Mildred. Post la naskiĝo de nia filino Ester, ni vojaĝis al Bolivio, kiam ŝi havis kvar monatojn.

Akcidento de trajno

Mildred kaj mi tre timis veturi per aviadilo. Do ni decidis veturi la unuan parton de la vojaĝo per trajno: 3.000 kilometrojn ek de Kansas Urbego ĝis Miami, Florido. Iun matenon, la trajno veturis 100 kilometrojn po horo en norda Florido kiam ĝi frapis ŝarĝaŭton haltintan en la trako. La ŝarĝaŭto estis ŝarĝita de skatoloj de oranĝoj. Per la granda frapo, iuj skatoloj estis ĵetitaj 20 metrojn supren. Peco de la ŝarĝaŭto penetris la kajuton de la lokomotivo, mortiginte la lokomotivestron kaj vundinte lian helpanton. Alia peco de la ŝarĝaŭto penetris la fronton de la lokomotivo. Se ĝi falus sur la trako, ni certe detrakiĝus. Nia vagono estis nur la dua malantaŭ la lokomotivo. La anĝeloj de la Sinjoro certe ŝirmis nin tiun tagon! Ester eĉ ne estis ĵetita el sia lulilo.

La vundita helpanto devis forte haltigi la trajnon kun la rezulto ke ĝiaj radoj estis difektitaj. Tial estis necese veturi malrapide, anstataŭ 100 kilometroj po

horo, nur 65 kilometroj hore. Ankaŭ multaj el la pasaĝeroj pretendis esti vunditaj. Tuj la estroj de la kompanio sendis kuracistojn por ekzameni ilin dum la trajno estis haltigita. Laŭplane, la trajno estus devinta alveni al la urbego Miami je la 21-a horo. Sed pro la akcidento kaj la longa halto, la trajno alvenis al la urbego je la 1-a kaj duono de la mateno, kaj nia aviadilo forflugis je la 1-a horo!

Kion fari? Ni ne sciis kien iri. La staciestro deziris fermi rapide la stacion. “Tie en la alia flanko de la strato estas hotelo,” li diris. Sed mi telefonis al la policstacio kaj mi klarigis nian situacion al la deĵora serĝento. Li estis tre ĝentila kaj helpema homo. Mi menciis la proksiman hotelon. Li respondis, “Ne iru tien! Tiu estas tre aĉa gastejo.” Li retenis min ĉe la telefono dum li telefonis kelkajn hotelojn kaj finfine li trovis bonan kaj malmultekostan hotelon kaj li klarigis al mi kiel iri tien. Tre malfrue en la nokto, taksio portis nin tien.

Flugo al Honduraso

Sed la akcidento tute fuŝis nian horaron. Nia evangelia misio ne havis multe da mono kaj ni havis biletojn de malmultekosta flugkompanio el Honduraso. Ni havis du elektojn: resti en Miami kelkajn tagojn aŭ flugi al Lima, Peruo kaj resti tie kelkajn tagojn ĝis ni povos

flugi al La Paz, ĉefurbo de Bolivio. Mi jam sciis paroli hispane, kaj mi decidis flugi al Lima, pensante ke la kosto de gastejo tie estus pli malmultekosta.

Do, ni enaviadiliĝis por flugi al Tegucigalpa, ĉefurbo de Honduraso. La aviadilo estis tro ŝarĝita: la unuaj kvar vicoj de seĝoj estis stokitaj per pakaĵoj ĝis la plafono. La aviadilo l-o-n-g-e penis leviĝi al ĉielo. Alveninte al Tegucigalpa, nuboj kovris la valon kie ĝi estas. La piloto ĉirkaŭiris, ĉirkaŭiris ĝis li trovis truon en la nuboj, kaj ni rapide surteriĝis. Niaj stomakoj restis supre en la ĉielo!

Ni devis atendi kvar aŭ kvin horojn en Tegucigalpa antaŭ daŭrigi la vojaĝon al Lima. La flugkompanio pagis por tre bongusta manĝo en restoracio trans la urbego kaj en bela kamparo. La kompanio eĉ pagis por la taksioj kiuj portis la pasaĝerojn tien. La perantoj de la kompanio avertis nin ke ni nepre devas iri rekte al la restoracio kaj reiri rekte al la flughaveno.

Mia familio kaj mi havis la malfeliĉon veturi en taksio kun fianĉa paro kiu deziris trovi ambasadon kie ili povas geedziĝi. La taksioŝoforo laŭ sia flanko deziris porti mian familion en ekskurso tra la urbego, por pli da mono! Ni diris, “Ne! Ni volas iri rekte al la restoracio konforme al la ordonoj.” Do, la taksioŝoforo portis nin tra la pli malriĉaj partoj de la urbego. Li forlasis nin ĉe la restoracio kaj foriris kun la fianĉa paro. Ni atendis kaj atendis, kaj nia taksio ne revenis. Ĉiuj aliaj pasaĝeroj foriris en siaj taksioj. Kion fari? Mi telefonis al la perantoj de la kompanio kaj klarigis al ili nian problemon. Ili rapide sendis

kamioneton por porti nin al la flughaveno. Malmulte da tempo poste, alvenis la taksio kun la paro.

Flugo al Lima

Ni rigardis dum li petis monon de la perantoj. Ili forte neis lin. Li ne aŭdacis peti monon de ni! Je la deksesa horo ni enaviadiliĝis. La aviadilo havis kvar motorojn kun helicoj. Ĝi povis flugi nur malalte super la montoj de Centra Ameriko kaj Kolombio. Tial ni renkontis fluojn de aero kiuj kaŭzis ke la aviadilo forte supreniradis kaj malsupreniradis kiel lifto. Multfoje ni forlasis niajn stomakojn supre en la ĉielo.

En tiu tempo, la leĝoj de Usono nur permesis fremdajn flugkompaniojn flugi inter usonaj flughavenoj kaj la alilandaj ĉefurbegoj. Sed la flugkompanio de Honduraso estas pli lerta ol 'Onklo Sam!' Do, ni veturis kun alia flugkompanio al Bogota, Kolombio, alia flugkompanio al Quito, Ekvadoro, kaj alia flugkompanio al Lima, Peruo; sed ni faris la tutan vojaĝon en la sama aviadilo!

Ni alvenis al Lima post la noktomezo. La flugkompanio (de Honduraso) pagis unu nokton por ni en bona hotelo. Estis en la unuaj horoj de la mateno kiam ni enlitiĝis. Subite mi aŭdis voĉon el la mallumo, “Ĉu ni devas flugi per tiu aĉa flugkompanio pri kiu vi informis min?” Antaŭe, laŭ niaj planoj, ni flugus per tre bona kaj sendanĝera flugkompanio de Lima ĝis La Paz. Sed ĉar la trajn-akcidento fuŝis niajn flugplanojn, ni devis flugi per tre, tre aĉa flugkompanio al La Paz. Tiu kompanio havas tristan historion de multaj akcidentoj. Kiam akcidento okazis, la perantoj de tiu

kompanio kutimis lupreni aviadilon de alia kompanio por serĉi la lokon de la akcidento. Ili ne fidis la aviadilojn de sia propra kompanio! Mi estis informinta al Mildred pri tio. Tial, ŝi faris la demandon. Mi ne povis mensogi al ŝi; do, mi silentis. La silento informis al Mildred ĉion. Ŝi maltrankviliĝis dum la kvar tagoj kiujn ni pasigis en Lima.

La tagon post nia alveno al Lima, mi komencis serĉi malmultekostan gastejon. Homo en seminario de la Metodista Eklezio informis min, ke nun estas feria tempo kaj ne estas studentoj tie. Ni povus gastigi tie pagante 30 'solojn' nokte po persono. La dolaro valoris 28 solojn je tiu tempo; do, la tuta familio povis gastigi tie por iomete pli ol tri dolaroj po nokto. Mi pravis, la restado en Lima estis tre malmultekosta kompare al Miami.

La aventuro finiĝas

Alvenis la tago kaj la horo de nia flugo al La Paz. La montoj inter Peruo kaj Bolivio estas tre altaj. Nia aviadilo de kvar helicoj ne povis flugi super ili. Do, ni serpentumis inter la pintoj! De tempo al tempo, la piloto parolis al ni per laŭtparolilo, "tie dekstren (aŭ maldekstren) estas monto kun la nomo de ...". Rigardante tra la fenestro, oni vidis la flankon de la monto malmultajn metrojn for de la flugilo. Ni devis rigardi supren por vidi la pinton!

Finfine, ni alvenis al La Paz post tro aventura vojaĝo. Mia kapablo paroli hispane bone servis nin. Ni tre dankis Dion pro Lia ŝirmado meze de la danĝeroj kaj la problemoj de la vojaĝo.

☪

El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

16. junio

Kompatema Dio, helpu nin labori por la paco en la mondo, en la lando, en la urbo, en la eklezio, en la familio kaj en niaj propraj koroj.

Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso sur paĝo 74).

Tiel Vi subtenos la agadon "Stichting Zienderogen" iniciata de J. Tuinder.



Graco

Unue vi ploras.

Poste vi blasfemas.

Poste vi preĝas.

Poste vi streĉigas ĝis la rompo de ĉiuj viaj restantaj fortoj.

Vi volas, per ĉiel-ataka forto -

Kaj sur la obstina muro de la neeblo

Vi frakapas vian kapon.

Poste vi svenas.

Kaj se vi denove rekaptas vian memscion, vi komencos ĉion denove.

Je la fino vi per apatia vertiĝo,

Sen vortoj, sen pensoj

Diras al vi mem: vane, senutile:

La kulpo, la malsano, la mizero,

El la malliberujo de la ĉiutaga terura grizeco

Ne ekzistas eskapado!

Kaj tiam – de si mem – malfermiĝas la ĉielo,

Kiu ne malfermiĝis pro malbeno, pro preĝo,

Forto, volo, malespero,

Pento – vane bombardadis.

Tiam malfermiĝas de si mem la ĉielo.

Kaj unu malgranda stelo promenas al vi,

Kaj tiel proksimen venas, bele ridetante,

Ke vi kredas: faliĝas sur vian manplaton.

Tiam – de si mem – finiĝas la ŝtormo.

Tiam – de si mem – ĉio silentiĝas.

Tiam – de si mem – viviĝas la espero.

Sur la ora branĉo de via sonĝ-arbo

De si mem – freŝa frukto maturiĝas.

Tiu ĉi *de si mem*: tiu estas la Graco.

Sándor Reményik:
estis rumania hungara
poeto, naskita en
Koloĵvaro en 1890 kaj
mortinta samloke en
1941.

Tradukis
Ágnes Ráczkevy-Eötvös

Tutmonda Etiko kaj la afiŝo “Paco indiana”

Informis Siegfried KRÜGER, DE

La projekto Tutmonda Etiko estas provo priskribi la komunaĵojn de la mondaj religioj kaj starigi regulojn, kiujn ĉiu povu akcepti. La projekton iniciatis la svisa teologo Hans Küng.

La bazaj konvinkoj de la projekto Tutmonda Etiko estas

- neniuj kunvivadoj sur nia tergloba sen globala Etiko
- neniuj pacoj inter la nacioj sen paco inter la religioj
- neniuj pacoj inter la religioj sen dialogo inter la religioj
- neniuj dialogoj inter la religioj kaj kulturoj sen fundamenta studado
- neniuj globalaj etikoj sen ŝanĝiĝo de konscio de religieco kaj ne-religieco

“Ĉi tiu unu mondo bezonas etikon; Ĉi tiu mondkomunumo ne bezonas unuecan religion kaj unuecan ideologion, sed kelkajn interligajn kaj devigajn normojn, valorojn, idealojn kaj celojn.”

Hans Küng

Ligiloj:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Monda_Etiko

<http://www.weltethos.org/>

Paco indiana

La kvin ĉeftaskoj en la homa komunumo estas reprezentataj simbole per totembesto. De sube supren sur la totemo:

Urso	Gardado kaj defendo,
Mustelo	Provizado,
Ezoko	Edukado,
Testudo	Medicino,
Aglo	Gvidanteco kiel gardanto de justeco kaj paco.

La afiŝon kreis la grafikistino Barbara Cain el Berlino, kiu ne nur respondecas pri la grafika prezento sed ankaŭ pri la organizo kaj kvalito de la diverslingvaj tradukoj.

La iom alia originala afiŝo (kun la centra teksto en la irokeza, germana kaj angla

lingvoj) same aperis en la eldonejo Eisenkorn/Berlino. La eldonon de la afiŝo en la nuna prezento kun la teksto en Esperanto en la centro kaj pluaj 118 lingvoj (formato 60 x 42 cm) estas iniciato de familio Wera kaj Detlev Blanke, Germanio.

La indianan saĝaĵon (de irokezo) esperantigis la irlanda diplomato d-ro

Seán O'Riain. Jen la teksto, tradukita en la diversajn lingvojn:

“Paco ne estas nur la kontraŭo de milito, ne nur la periodo inter du militoj. – Paco estas multe pli. Paco estas la leĝo de la homa vivo. Paco estas tiam, kiam ni agas juste kaj kiam inter iuj unuopaj homoj kaj iuj popoloj regas justeco”.



3

Sur la afiŝo ankaŭ troveblas adreso de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Apud tio estas spaco por plua adreso.

Krome oni trovas jenajn retadresojn: www.uea.org, www.esperantic.org, www.lernu.ne.

La afiŝo ne estas evento-dependa kaj efike montreblas sur ĉiuj aranĝoj, kie temas pri lingvoj kaj pri Esperanto. Ĝin senpage disponigos familio Blanke en certaj kvantoj por esperanto-organizaĵoj kaj grupoj.

Jen la kontaktablo: detlev@blanke-info.de


Listo de aliĝintoj al 66-a KELI kongreso

Bratislava, Slovakio, 16. – 23. 7. 2016

1 Farkas Antal,	Rumanio	24 Ojasild Joonatan	Estonko
2 Stamm Sieglinde,	Aŭstrio	25 Polnický Tomáš	Ĉeĥio
3 Popovicu E Ecaterina,	Rumanio	26 Polnická Miloslava	Ĉeĥio
4 Ojasild Endel,	Estonio	27 Pospíšilová Ria	Ĉeĥio
5 Fischer O Arnošt,	Ĉeĥio	28 Panáčková Emilie	Ĉeĥio
6 Stier Gabriella,	Rumanio	29 Chrdle Petr	Ĉeĥio
7 Lászlo Maria,	Rumanio	30 Landfors Anna	Svedio
8 Olah M Judita,	Rumanio	31 Landfors Mats	Svedio
9 Scurt T Ildiko,	Rumanio	32 Järnlström Agneta	Svedio
10 Cousson Philippe,	Francio	33 Mynttinen Synnöve	Finnlando
11 Birta Szabolcs,	Rumanio	34 Křížková Jana	Ĉeĥio
12 Polnický Pavel,	Ĉeĥio	35 Kavková Nikola	Ĉeĥio
13 Pospíšil Václav	Ĉeĥio	36 Kavková Adéla	Ĉeĥio
14 Åradsson Bengt Olof	Svedio	37 Lovász Lidia	Rumanio
15 Åradsson André	Svedio	38 Bánáti Katalin	Hungario
16 Ráczkevy-Eötvös Ágnes	Hungario	39 Éva Farkas-Tatár	Hungario
17 Krüger Siegfried	Germanio	40 Éva Farkas	Hungario
18 Puijenbroek v Ruth	Svislando	41 Feifíčová Magdaléna	Slovakio
19 Bisset David	Britio	42 Leuze Ernst	Germanio
20 Bisset Jean	Britio	43 Gaillard Samuel	Francio
21 Párkányiné Erzsébet	Hungario	44 Cayzac Hanna	Francio
22 Schaeffer Karl Heinz	Germanio	45 Klesová Helena	Ĉeĥio
23 Schaeffer Hedwig	Germanio	46 Pesti Antal	Hungario

Kompleta adreso de
nia kongresejo estas:

Universita Komenského v Bratislave
Evanjelická bohoslovecká fakulta
Bartókova 8, 811 02 Bratislava



Tagordo por la Jarkunveno de KELI 2016

- 1 Malfermo
- 2 Elekto de kunprotokolantoj
- 3 Akcepto de la tagordo
- 4 Komunikoj
- 5 Funebra memorigo
- 6 Sekretaria jarraporto
- 7 Kasista jarraporto
- 8 Raporto de la kaskontrolantoj
- 9 Diskuto kaj akcepto de la raporto
- 10 Buĝetoj
- 11 Raporto de la redaktoro
- 12 Estrarelekto
- 13 Kongresplanoj – 2017 en Zöblitz
- 14 Proponoj kaj sugestoj de la membroj
- 15 Fermo

Klarigoj:

- (12) *Ĉi-jare finiĝas la 3-jara deĵor-periodo de Philippe Cousson kaj Samuel Gaillard. Ambaŭ estas reelekteblaj.*
- (13) *La KELI-kongreso 2017 okazos en Zöblitz (Germanio)*

Zöblitz [Zeblico] (ĉerpoj el Vikipedio)

(esperante Zeblico), situas ĉirkaŭ 600 metrojn super marnevelo en feria regiono de la Ercmontaro en suda Saksio en Germanio. Ekde la 31-a de decembro 2012 ĝi estas parto de la granda distrikta urbo Marienberg. Antaŭe ĝi estis kun la vilaĝoj Sorgau kaj Ansprung kaj kelkaj aliaj urbopartoj memstara urbeto, havanta preskaŭ 3000 enloĝantojn. Ĝi estas menciita la unuan fojon kiel zobelin en 1323.

Zeblico estas la centro de la saksia serpenteŝtonprilaboro, fama pro la zeblica serpenteŝtono, kiun oni povas trovi.

Triono el la loĝantaro de Zeblico apartenas al la evangelia eklezio. Ilia pastro estas ekde 2006 Wolfram Rohloff, esperantisto, prezidanto de la germana sekcio de KELI.

Vidinda estas la urba preĝejo el la jaro 1728: interno en Jugendstil (art nouveau) ekde 1904, baroka altaro kaj baptujo el tornita serpenteŝtono, baroka orgeno de Gottfried Silbermann el la jaro 1742, restoj de antaŭa preĝejo el 1487.

En Zeblico okazis de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2012 la 62-a KELI-Kongreso kaj en 2017 okazos denove KELI-kongreso en Zeblico.



Financa raporto de KELI 2015 (Ĉiuj sumoj en EUR)

	Bilancoj fine de la jaroj	
	2014	2015
Aktivoj		
Stokoj de libroj	4.925,03	4.925,03
Stoko de kasedoj, E-Misio	<u>116,00</u>	<u>116,00</u>
<i>Provizo</i>	<i>5.041,03</i>	<i>5.041,03</i>
Postuloj – LKK de Strasburgo	6.013,00	0,00
Postuloj (IKUE, profito el kongreso)	1.342,00	0,00
Kasista kaso	20,00	0,00
Sekretaria kaso	828,00	997,00
UEA-konto kelk-p	8.659,72	9.303,32
Ĝir-konto, CIC-banko	609,55	1.822,00
Ŝpar-konto, CIC -banko	<u>26.308,32</u>	<u>30.540,99</u>
<i>Monrimedoj</i>	<i>43.780,59</i>	<i>42.663,31</i>
Sumo de aktivoj	48.821,62	47.704,34
Pasivoj		
Kapitalo	21.510,12	22.473,33
Rezulto de la jaro	<u>963,21</u>	<u>-802,76</u>
<i>Kapitalo entute</i>	<i>22.473,33</i>	<i>21.670,57</i>
Dumvivaj membroj	2.358,50	2.240,50
E-Misio	6.894,51	6.894,51
Helpa kaso	1.550,48	1.658,58
Kongresa rezerva kaso	1.823,48	1.823,48
Literatura/Himnara kaso	<u>12.941,57</u>	<u>12.941,57</u>
<i>Fondusoj entute</i>	<i>25.568,54</i>	<i>25.558,64</i>
Kreditoroj (finna kaj brita kaso)	0,00	0,00
Evidente	717,25	395,13
KELI-abonoj de EK	12,50	0,00
Kongresaj kotizoj	<u>50,00</u>	<u>80,00</u>
<i>Transitaĵoj kaj pasivoj</i>	<i>779,75</i>	<i>475,13</i>
Sumo de pasivoj	48.821,62	47.704,34

Klarigoj kaj rimarkoj pri la bilanco 2015-12-31

Aktivoj

Stokoj

En la jaro 2015 ne ŝanĝiĝis la Stokoj de libroj aŭ kasedoj. Estus bone malgrandigi nian stokon kaj eble sendi librojn kaj kasedojn al malriĉaj landoj aŭ al tiuj landoj, kie la kristanoj vivas minoritate.

Postuloj

La jaro 2015 komenciĝis per du postuloj. La LKK de Strasburgo ricevis en 2014 monon por rezervi la dorm-lokojn, kiun sumon la organizantoj post la alveno de la kongres-kotizoj en ordo repagis. La kongreso en Trento 2014 havis profiton, kiun la LKK de Trento de IKUE en ordo pagis, do ambaŭ postuloj plenumiĝis

Monrimedoj

Kasista kaso estas ĉe Ágnes Ráczkevy-Eötvös (HU), kutime kun malalta sumo. Sekretaria kaso estas ĉe Pavel Polnický (CZ), kiu zorgas pri la presado kaj dissendado de Dia Regno. Monrimedoj estas parte en la bankkonto kaj en la kaso de Kristana sekcio de ĈEA.KELI havas bankkontojn ĉe franca CIC-banko kaj ĉe UEA (kelk-p).

Pasivoj

Kapitalo

Kapitalo enhavas la sumigitan rezulton de la antaŭaj jaroj. La rezulto de la jaro 2015 estis bedaŭrinde negativa: -802,76 eŭroj.

Fondusoj

Laŭ la decido de la estraro Dumvivaj membroj, E-Misio, Helpa kaso, Kongresa rezerva kaso kaj Literatura/Himnara kaso estas aparte montritaj. En 2015 ne okazis gravaj ŝanĝoj ĉe tiuj ĉi fondusoj, nur je la Helpa kaso, kiu estas por helpo al nepagipovaj membroj partopreni kongreson.

Transitaĵoj kaj pasivoj

En la jaro 2015, kiel en ĉiuj jaroj, KELI-anoj kolektis monon al la fonduso Stichting Zienderogen (antaŭa Evidente). La sumo jam estas transkontigita al la fonduso Zienderogen.

Bedaŭrinde en tiu ĉi jaro ni povis sendi pli malmulte da mono al tiu grava laboro, kiun komencis nia iama prezidanto Jacques Tuinder. La kongresaj kotizoj estas la antaŭpagitaj aliĝ-kotizoj, kiuj alvenis rekte al la bankkonto de KELI kaj estos ĝiritaj al LKK.

Rezulto 2015 kaj buĝetoj 2015, 2016 kaj 2017 (Ĉiuj sumoj en EUR)

	Buĝeto 2015	Rezulto 2015	Buĝeto 2016	Buĝeto 2017
Enspezoj				
Kotizoj/Abonoj	2.400	2.174,90	2.350	2.350
Kotiz- kaj kursdiferencoj	0	0,00	0	0
Adopta Kaso	<u>600</u>	<u>265,22</u>	<u>400</u>	<u>400</u>
<i>Kotizoj entute</i>	3.000	2.440,12	2.750	2.750
Librovendado	100	10,00	50	50
Rentumoj	450	232,67	300	300
Profito el kongreso	<u>200</u>	<u>0,00</u>	<u>200</u>	<u>200</u>
<i>Aliaj enspezoj</i>	750	242,67	550	550
Enspezoj entute	3.750	2.682,79	3.300	3.300
Elspezoj				
Presisto kaj sendado de DR	2.650	2.703,00	2.600	2.600
Perantoj	<u>0</u>	<u>0,00</u>	<u>0</u>	<u>0</u>
<i>Revuokostoj</i>	2.650	2.703,00	2.600	2.600
Prezidanto	20	20,00	20	20
Sekretario	70	70,00	70	70
Redaktoro	250	250,00	150	150
Kasisto/Matrikulisto	<u>20</u>	<u>20,00</u>	<u>20</u>	<u>20</u>
<i>Estrarkostoj</i>	360	360,00	260	260
UEA-kotizo	60	64,00	65	65
Kaskontrolo	0	0	0	0
Bankkostoj	250	358,55	250	250
Merituloj	50	0,00	50	50
UK Lukostoj	<u>50</u>	<u>0,00</u>	<u>50</u>	<u>50</u>
<i>Ĝeneralaj kostoj</i>	410	422,55	415	415
Librovendado (kostoj)	20	0,00	10	10
Varbado (Inf./varba kaso)	20	0,00	10	10
Rabatoj de Perantoj	<u>10</u>	<u>0,00</u>	<u>5</u>	<u>5</u>
<i>Aliaj elspezoj</i>	50	0,00	25	25
Elspezoj entute	3.470	3.485,55	3.300	3.300
Saldoj	280	-802,76	0	0

Klarigoj kaj rimarkoj pri la Rezulto 2015 kaj la Buĝetoj 2016/2017

Enspezoj

Kotizoj

La Kotizoj en 2015 estis iom malpli ol planitaj. Bedaŭrinde al la Adopta kaso pli malmultaj mondonacoj alvenis ol ni esperis, kvankam pli ol en la antaŭa jaro. La Adopta kaso estas mondonacoj de la KELI-membraro por membroj, kiuj ne povas pagi la kotizojn aŭ nur parte. Ili estas petataj kontribui "laŭforte". Koregan dankon al ĉiuj donacintoj kaj donacontoj.

Aliaj enspezoj

Minimala librovendado okazis dum la jaro. La sumo de Rentumoj estis pli malgranda, kaj verŝajne tio restos tiel ankaŭ en la sekvontaj jaroj. La Ĉijara kongreso, kvankam estis en okcidenta lando (Francio, Strasburgo), tamen fermiĝis kun modesta profito. La sumo (102 eŭroj) estis tiel malalta, ke ni decidis donaci tiun ĉi sumon al la fonduso Stichting Zienderogen (antaŭa Evidente).

Elspezoj

Revuokostoj

La kostoj de Dia Regno enhavas kaj la presadon kaj la dissendadon. Ĉi-jare estis iom altiĝitaj poŝtarifoj de Ĉeĥa poŝto.

Estrarkostoj

En 2015 la kostoj estis la planitaj sumoj.

Ĝeneralaj kostoj

En tiu ĉi kategorio en la jaro 2015 estis nur la UEA-kotizoj kaj Bankkostoj

Aliaj elspezoj

En la jaro 2015 KELI ne pagis aliajn elspezojn.

Saldoj

La saldo de la jaro 2015 estis bedaŭrinde negativa: - 802,76 eŭroj. La mal-altiĝo de la sumo de la Kotizoj kaj la Adopta kaso jam pasintjare komenciĝis, sed ni multe esperas, ke tio estis escepto. Ni ankaŭ devas pripensi la eblecon de modesta kotiz-altiĝo, ĉar jam dum pluraj jaroj ni havas la saman kotizon, kaj bedaŭrinde dumtempe la presado, la poŝtaj kaj bankaj kostoj altiĝis. La financa bazo de KELI tamen daŭre estas akceptebla.

Buĝetoj

La Buĝetoj de la jaroj 2016 kaj 2017 estas en la Enspezoj planitaj optimiste, kredante ke la membraro de KELI daŭre subtenos nian Ligon kaj niajn membrojn, kiuj vivas inter pli malbonaj vivcirkonstancoj. Ni tamen pro la sekureco planas ĉirkaŭ nulo-staton al la sekvontaj du jaroj.

Informoj

Unua antaŭinformilo por Bibliaj Tagoj 2017

Dato: 1a (merkredo) ĝis 5a (dimanĉo) de februaro 2017.

La Bibliaj Tagoj en la jubilea jaro 2017 okazos en Wittenberg. Tie ni rezervigis en la junulargastejo, rekte apud la kastela preĝejo en la historia centro, ĉambrojn. Pli da informo ĉe Wolfram ROHLOFF, ret-adreso: keli.prezidanto@web.de

Ebla programo:

- meso, matena diserv(et)o (germane: Morgenandacht), vespera preĝo ĉiutage;
- kantado el ADORU;
- legado, instruado kaj diskuto pri biblia temo aŭ libro.

Proponoj de Vi bonvenas.

Kultura programo:

- Gvidado tra la urbo, al la urbopreĝejo kaj la kastelpreĝejo.
- Vizito de la “Lutherhaus” (iama monaĥejo, kaj loĝdomo de Luther) kun ĉiĉerono (eble ankaŭ vizito en la “Museumspädagogik”, kie oni ekzemple instruus al ni skribi per plumo k.t.p. kiel dum la tempo de Luther.)
- Unu ekskurso, eble (per trajno) al Gräfenhainichen aŭ al alia interesa urbo.



Laste aperis

Julia SIGMOND eldonis novan libron KVIN GEAMIKOJ. La libro estas rezulto de ŝia ŝatokupo – korespondadi. En la libro Julia Sigmond prezentas leter-interŝanĝojn kun Ada Fighiera-Sikorska, Johannes Palu, Nikolao Danovskij, Stanislaw Janusiewicz kaj Tibor Sekelj.

Antaŭ 60 jaroj J.S. eklernis Esperanton, ĝuste por povi korespondadi. Per ĝi ŝi trovis multajn korespondamikojn. ☞

Havebla ĉe FEL

<http://www.retbutiko.net/ie/ero/kgva>

Prezo: €18.90 (-16% ekde 3 eroj)

Paĝoj: 479

Larĝo: 132 mm

Alto: 200 mm

Eldonjaro: 2016

Pezo: 526 g

ISBN: 978-973-7803-31-3

La malapero de David Kelso

Britio 1945 – 1960 – 2010

Rememoras Ed BORSBOOM

En 2005 mi ricevis leteron de nekonata Esperantisto, David Kelso, la prezidanto de la brita SAT-sekcio, kiu nomiĝas SATEB. Li invitis min prelegi en la kongreso de tiu organizo en majo 2006. Pro tio, ke mi en la antaŭa jaro decidis ne plu vojaĝi al Anglio, la letero migris al la paperkorbo. Relegante ĝin la postan tagon, mi estis frapita de la tono en la teksto: ĝi estis tiel bonkora, simpatia, ke mi ne povis rifuzi la peton.

Post mia kongresa partopreno David Kelso gastigis min kelkajn tagojn en sia domo en Skotio kaj transprenis la taskon de ĉiĉerono. Li ne nur montris la urbojn Glasgow kaj Edinburgo sed inter alie ankaŭ aranĝis sukcesan rendevuon kun la de mi admirata John Francis. David dume multe rakontis pri sia vivo. Dum la lastaj jaroj antaŭ la pensiigo li laboris kiel inspektoro de la mezgradaj lernejoj.

Plurfoje li tre entuziasme priskribis sian ĉiujaran veturadon al Kalabrio en suda Italio. Tie staris en iu urbeto lia somerdomo. Mia nova kamarado laŭdis la tiean klimaton, belan naturon kaj helpemajn, afablajn loĝantojn. Li sentis

sin tie kiel fiŝo en akvo. Mallonge la skoto kaj mi fariĝis bonaj amikoj. Dum la OSIEK-kongreso en 2007 en la bulgara urbo Pazarĝik, ni revidis unu la alian. Ravis min tie lia prelego pri mitoj kaj legendoj. Ekde tiam ni hazarde ne plu havis kontakton.

Iom poste mi aŭdis, ke David fariĝis prezidanto de SAT, bona elekto, sed baldaŭ transprenis la belgo Jacques Schramm tiun funkcion. Ĉi tiun novan prezidanton mi vidis en Antwerpen en 2011 kaj mi demandis lin pri la kaŭzo de la abdiko de lia antaŭulo. Li respondis “*Ĉu vi ne scias, kio okazis?*”

London la 15-an de novembro 2010 David Kelso ekpromenis el sia itala domo por eble fari piedmigron, sed li ne revenis. Centoj da homoj serĉadis la briton helpe de dresitaj hundoj kaj de helikoptero. Neniu indico estis trovita. Kio okazis? Ĉu trafis lin subita atako je la sano? Ĉu falo en ravinon? Ĉu krimulo kaptis lin? Ĉu li memvole forkuris? Ni ne scias. Kia abomeninda elviŝo!

Adiaŭ, amiko.

En Maj' la grizo de l' natur'

IM MAIEN HEBT DIE SCHÖPFUNG AN

1. En Maj' la gri-zo de l' na-tur'
Fre-si-ĝas ĉi-u kre-a-tur'
ver-di-ĝas kaj ek-flo-ras.
kaj la Kre-in-ton glo-ras.
Nun, en ĉi temp' de ĝoj' kaj rav',
ek-flo-ru an-kaŭ ni-a sav',
no-vi-ĝu ni-aj ko-roj.

IM MAIEN HEBT DIE SCHÖPFUNG AN • GL (Speyer)
897, nGL (Speyer) 883 • M (Ein schöne Ros): Trier 1653
• germana T: © Friedrich Dörr 1973 • E (tre libere): Albrecht
Kronenberger 2016-05-11

- | | | |
|--|--|--|
| 2. | 3. | 4. |
| La semo en la sin' de l' ter',
la riĉa Dia beno,
preparas sin en primaver'
fariĝi nutra greno.
Printempan semon portas
vi,
en via sin', ho Virgulin',
kaj vi lin naskos, Kriston. | Ho frukto-dona bona grund',
en vi enradikiĝas
la sav' de l' mondo. Ni ĝis
fund'
per li, en li saniĝas.
Ho kia am' de Di' al ni!
Grandajojn faris Li al vi.
La Eternul' favoras. | Nun via kor' altigas Lin,
ĝoj-krias kun ekscito.
Ĉar Li vin faris Di-patrin',
graveda de l' Spirito.
Nun ankaŭ ni kun ĝojoplen'
en ĉi printempa flor-ĝarden'
al Dio kantu laŭdojn. |

Rimarko:

Kvankam temas pri takto de tri kvaronoj, la unua kvarono – almenaŭ laŭ germana kutimo – ne nepre estas akcentenda. Taŭgas ankaŭ – eble eĉ pli bone – aliaj melodioj de la tiel nomata “Lutera Strofo”, ekzemple: *Ich steh an deiner Krippe hier*, ADORU 245; *Lobt Gott den Herren, ihr*, ADORU 528; *Luther's Hymn*, ADORU 493; *Sei Lob und Ehr*, ADORU 093.

La spaco ne permesas montri la aliajn eblajn melodiojn, kiujn Albrecht Kronenberger proponis /Red